## Babilada rondo

… okazos je la 19-a, vendrede …

**La 6-an de junio**
ĉe François Randin…
Ch. de Vallombreuse 14, Lausanne
076 411 14 55

**La 20-an de junio**
ĉe Charlotte Blanc Maillard
Avenue Nestlé 7, Vevey
021 922 34 74

**La 4-an de julio**
ĉe François Randin
Ch. de Vallombreuse 14, Lausanne
076 411 14 55

Ne forgesu aliĝi ĉe
http://doodle.com/teum7w3gz46vdyc6

## Citaĵo

*La homaro devos meti finon al la milito, aŭ la milito metos finon al la homaro.*

*J.-F. Kennedy*

## Interesega leciono

Eta Joĉjo revenas de la lernejo.

Jozefino : - Vi estas malfrua!
Joĉjo: - Jes, panjo. La instruistino devigis min resti post la leciono.
Jozefino: - Kial ?
Joĉjo: - Laŭ ŝi, mi revadis dum la leciono.
Jozefino: - Estis enuiga leciono, ĉu?
Joĉjo: - Kiel mi scius tion? Mi ja revadas dum ĈIUJ lecionoj....


**Laŭzana Esperanto – Societo**

Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22
+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28
sekretario@eo-l.ch * ww.esperanto-lausanne.ch
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56



**Laŭzana Esperanto-Societo**

# Informilo

Junio 2014 – n° 6


## Sabate la 28-an de junio

# Jara ekskurso


## al la "Arkeo de Noa"

("Arche de Noé") apud Vicques (JU)

* * * * * *Informoj **ĉi-ene*** * * * * *

## Somera paŭzo

*Ĝojajn feriojn al ĉiuj !*



**Lunde la 1-an de septembro**
*Prelego de André Cherpillod el Francio.*

**Lunde la 6-an de oktobro**
*Esperantaj gramatikaĵoj kaj nialingvaj malfacilaĵoj.*

**Lunde la 3-an de novembro**
*Sébastien Moret parolos al ni pri esperantologio kaj lingvistiko.*



# Jara ekskurso
## al Arkeo de Noa
## en Vicques (JU)



Karaj membroj kaj amikoj,

Ĉijare ni vizitos la muzeon « Arche de Noé » apud Vicques. Tiu muzeo prezentas multe da pajloŝtopitaj bestoj en « natura » medio. Ni veturos per privataj aŭtomobiloj.

Ni invitas vin aliĝi (**antaŭ la 20-a de junio)** ĉe nia sekretario François Randin (076 411 14 55) aŭ rete aŭ "dudele" al http://doodle.com/gdix24a7qten8hhf ... dirante, ĉu vi ŝoforos aŭ ĉu vi pasaĝeros.

Ni rendevuos je la 8-a en Laŭzano, norde de la aŭtoparkejo du "vélodrome" (apud la strato "Plaines-du-Loup). Ni haltos survoje kafumante. La vizito okazos je la 11-a. Surloke ofertiĝos al ni kafo kaj kornbulko. Poste gvidist(in)o kondukos nin tra la muzeo kaj fine ni piknikos en la ĝardeno (manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de vi mem) aŭ se malvarmos ... en muzea loko. Posttagmeze ni reiros Laŭzanen, haltante laŭ deziroj.

Ni esperas, ke ni multnombros, tamen aliĝu rapide, tiel ni povos organizi la transporton de ĉiuj. Ne hezitu inviti amikojn (ĉefe se ili plezure ŝoforos niajn membrojn).

La vizito popersone kostos (kafo kaj bulko inkluzivitaj) CHF 22.-.

Ne bezonas diri, ke ... la pasaĝeroj donacos "ion normalan" al la ŝoforoj por la veturado.

Amike al vi !

Karlota, Knud kaj Francisko

## **Veturvojo** (150 km) :

... GPS-e: Vicques (kantono Jura), chemin de la Filature

... mape : Aŭtoŝoseo Lausanne - Neuchâtel – Bienne kaj direkto al Delémont. Trapasu Moutier kaj Courrendlin. Je la elirejo de la vilaĝo, iru dekstren, al direkto Vicques. Trairu tiun vilaĝon kaj ekstere de ĝi (strato Recolaine) post vigla vojturno dekstra, daŭrigu proksimume 800 metrojn sur tiu ĉefa vojo.

La strato « de la Filature » troviĝas dekstre.

La muzeo situas proksimume post 800 metroj.

Se problemas: 076 411 14 55 aŭ 079 210 97 75